"Kial ne krei novan lingvon?", daŭrigis la testudeto sur sia roko. "Kial ne krei lingvon, kiu estas facile lernebla kaj facile prononcebla por ĉiuj estaĵoj en la mondo? Unu lingvo, kiu ne malavantaĝas kaj ankaŭ ne avantaĝas iun ajn landon?". Ĝi rigardis la sube starantajn bestojn, kiuj rigide kaj perplekse rigardis ĝin. Ĝi esperis, ke ĝia propono estos akceptita. "Kaj kiamaniere...", la leono komencis malrapide kaj kolere "...ni kreu ĉi tiun lingvon?" La testudeto faris triumfan movon kun la piedo, ĉar dum sia malrapida migrado al la kunveno ĝi ja povis profunde pripensi la aferon. "Mi tion klarigos al vi." ĝi komencis kaj paroladis dum multaj horoj, kaj ju pli ĝi paroladis kaj klarigis la lingvon, des pli da bestoj estis allogataj al ĝia ideo. "Grandioze", rimarkis la krokodilo. "Mirinde", diris la leono. "Ni rekompencu ĝin!", decidis la irlanda koboldo. "Kompreneble", konsentis la bestoj. "Sed kiel?".

"Mi faros tion!", aŭdiĝis energia voĉo el la amaso, kaj la Hollywood-feino el Usono zumis supren al la ŝtono sur kiu la testudeto staris. Ŝi levis sian magian bastonon, diris kelkajn sorĉajn vortojn kaj ora pluvo verŝiĝis sur la korpon de la eta lingvo-eltrovinto, ĝis ĝi estis kovrita per oro de la kapo ĝis la piedoj. "Nun ni ĉiam agnoskos vin kiel nian plej grandan helpanton, kaj vi rajtas partopreni en ĉiu kunveno." deklaris la feino, kaj la amaso sub ŝi aplaŭdis. "Ne dankinde, ne dankinde." La feino riverencis kaj reflugis al sia origina loko. Sed la testudeto supre sur sia ŝtono ridetis per plej larĝa rideto kaj opiniis, ke entute ĝi povis esti tre kontenta pri si mem.

Tiun veran okazaĵon rakontis Katharina von Radziewsky en junio 2003,
kaj Klaus Friese tradukis

Esperanto Hamburg e.V.

Veranstaltungen donnerstags ab 19:30 Uhr
im Kulturladen St. Georg
Alexanderstraße 16
20099 Hamburg

Postadresse:
Klaus-Groth-Straße
20535 Hamburg

Telefon:+491601733980
http://esperanto-hamburg.de/
info@esperanto-hamburg.de

f e i n o

Unu horo pri Esperanto

por infanĝardenoj kaj antaŭlernejoj

Klaus Friese

en kunlaboro kun
Jürgen Wulff

kun bildkartoj por kolorigado de Kay Friese

Esperanto Hamburg

2018

Unu horo pri Esperanto

por infanĝardenoj kaj antaŭlernejoj

Klaus Friese, Rosa-Schapire-Weg 9, 21035 Hamburg, Tel. 040/7245395, friese@esperanto-hamburg.de

Enhavo

1. Enkonduko ... 2
2. Skizo por la sinsekvo de la instruhoro ... 3
2.1. Saluto ... 3
2.2. Prezentado ... 3
2.3. Klarigo ... 3
2.4. Pliampleksigo ... 3
2.5. Voĉlegado ... 3
2.6. Kolorigado de la bildkartoj ... 4
2.7. Adiaŭo ... 4
3. Proponoj por kontinuigi ... 4
3.1 Skeĉo por 5 aktoroj ... 5
3.2 Esperanto ganz kurz gefasst (por germanoj) ... 6
4. Ligiloj ... 6
5. Kliĉoj: Bildkartoj por kolorigado ... 7
6. Rakonto por voĉlegado ... 11

1. Enkonduko

En nia socio kreskas la nombro de la lingvoj, kiuj ĉi tie estas parolataj. Estas bone trakti tiun temon jam frue en infanĝardenoj kaj lernejoj. Por tio Esperanto ofertas interesan, facile realigeblan enirejon, kiu donas apartan kontribuon al la motivigo de la infanoj pri tiu temo.

Esperanto estas planlingvo, speciale farita por internacia interkompreniĝo sur neŭtrala bazo. Ĝi estis kreita kun klara strukturo, do relative facile lernebla. Neŭtrala signifas, ke homoj kun diversaj gepatraj lingvoj povas komuniki sen favori unu etnan lingvon super alia.

Kelkaj milionoj da homoj lernis Esperanton, kelkaj centmiloj parolas ĝin. Ili loĝas en pli ol 120 landoj. La granda avantaĝo de Esperanto estas, ke oni bezonas nur ĉirkaŭ trionon da tempo por lernado kompare al aliaj lingvoj. Krome antaŭa lernado de Esperanto faciligas poste la lernadon de aliaj lingvoj. Tio estas pruvita per lernejaj eksperimentoj.

Ĉi tiu propono estas suplemento al la broŝuro „Unu lerneja leciono pri Esperanto“ [1]. Ĝi skizas sinsekvon por instruhoro, kiu speciale en infanĝardeno aŭ antaŭlernejo povas bone ĝojigi ĉiujn partoprenantojn.

Kopirajto de la titolbildo: © violad, dollarphotoclub.com

6. Rakonto por voĉlegado

La ora testudo

Ĉiujare je la sama tempo sur malgranda insulo inter la kontinentoj la bestoj kaj la feoj el ĉiuj landoj kunvenas por okazigi grandan konferencon, kie ili interkonsiliĝas pri la aktualaj aferoj. "Mi...", diris la serpento, kiu en ĉi tiu iom malklara mateno reprezentis etan afrikan ŝtaton, "havas ion por deklari!" Kaj ĝi sinplaĉe ĉirkaŭrigardis en la aŭskultantan amason. "Nuuuu?", la egipta krokodilo oscedis kaj preparis sin por eldiri unu aŭ du utile sonantajn komentariojn, nur por poste povi senĝene dormi dum la resto de la kunsido. "La problemo, kiun ni traktu dum ĉi tiu tago", la serpento sen atento pri iu ĝeno siblis, daŭrigante sian paroladon "estas, ke ni ne komprenas unu la alian. Nur la plej kleraj el nia popolo scipovas paroli pli ol du lingvojn, sed neniam la samajn.".

La bestoj jam tre ofte evitis lerte trakti pri ĉi tiu demando, ĉar estis tre malkomforte, pensi pri demandoj, kies respondon neniu scias. Ili nun trude koliziis kun tio kaj nervoze ekskrapis per la piedoj kaj ekflustris. "Kaj?", nervoze demandis la Irlanda koboldo kaj turnis sian oran poton por eksidi (kiu pro la katastrofa monda ekonomia situacio enhavis nur unu butonon)."Ni ĝis nun ĉiam venkis la problemojn, ĉu ne?". "Tio ne estas vera!", konstatis ŝafo el la skotaj altaĵoj, kiu anstataŭis Nessie, kiu ja malvarmumiĝis. "Ni ne kapablas disvastigi gravajn novaĵojn. La koaloj en unu parto de la pluvarbaro ne scias ke brulas la alia parto. La fiŝoj mortas pro la akvomalpurigado el aliaj landoj ĉar neniu informas ilin pri iu ĵus venanta naftotajdo. Kaj ĉiujare ni okazigantoj de ĉi tiu konferenco devas lotumi por trovi la akceptotan konferencan lingvon. Tion vi nomas ‘venki la problemojn’ ?" La ŝafo blekis por fortigi siajn vortojn, ekkuŝis kaj ekmaĉis denove.

Dum momento regis silento, kiam en la kapo de iu aŭ alia eksterordinare pigra besto evoluis murdopensoj kontraŭ la malsperta ŝafo.Tiam subite decideme antaŭeniris la leono el Arabio: "Ni prenu mian lingvon!" Li levis la piedegon kaj demonstracie rigardis siajn ungegojn. "Ĉar mi estas la plej forta, la plej rapida kaj la plej danĝera inter ni ĉiuj. Kaj estas natura leĝo, ke venkas la plej forta. Tiam nia problemo povas esti solvita. Ĉiu lernos mian lingvon kaj ĉiu komprenos la alian!" "Ho ne," replikis lacerto, pri kiu neniu ekzakte sciis, de kie ĝi venis, "mia lingvo estos parolata. Mi estas la estaĵo kun la plej longa genealogia arbo. Krome mi devenas de la dinosaŭroj, do pro tiom da tradicio mi devas scii, kio estas bona!"

En la amaso ekaperis aplaŭda murmurado kaj la lacerto ĵetis malestiman rigardon al la leono. "Kial ne la mian?", kriis alta voĉo por supersoni la bruon, kaj kiam rinocero paŝis flanken, kuniklo ekaperis. "Mi estas tre fekunda. Kaj ankaŭ la lingvo de mia lando estos tia!" Unu hieno ridis, tial zebro batis ĝian faŭkon per hufo. "Ankaŭ mi estas tre fekunda. Do prenu mian lingvon!", singardeme proponis muso. "Kaj mian", kriis vombato samtempe kun antilopo. "Kaj mian...", grumblis leopardo. Baldaŭ montriĝis ke ĉiu besto kaj ĉiu lando volas disponigi sian lingvon, kiun la aliaj lernu, kaj ke neniu montris pretecon, forlasi sian propran starpunkton eĉ per nur unu paŝo favore al la najbaro. Nun, unu testudeto, kiu eĉ ne reprezentis landon, ĉar ĝi havis loĝejon sur malgranda insulo, aŭdis la kriadon kaj ekrampis malrapide, kiel la testudoj kutime faras, al la kunveno. Tie alveninte, ĝi serĉis la plej altan rokon de la ĉirkaŭaĵo kaj grimpis sur ĝin.

"SILENTON!", nekredebla blekego tremigis la bestojn, kaj ĉiuj rigardis, kvazaŭ tirate per ŝnuro, al la eta makulo sur la granda ŝtono. La testudeto kontente ridetis kaj gratulis sin pro sia laŭta voĉo. "Mi pensas", ĝi diris per alte levita voĉo, "ke mi havas solvon por via problemo." Denove ridis la hieno, sed ĝi tuj ankoraŭ ĝustatempe kaŝis sian dolorantan buŝegon per la propra piedego por eviti denovan punbaton.

Kliĉoj: Bildkartoj por kolorigado

h i e n o

z e b r o

m u s o

leopardo

2. Skizo por la sinsekvo de la instruhoro

2.1. Saluto

Ĉiuj infanoj kun siaj prizorgantoj sidiĝas en granda rondo sur la planko. Kiel gvidanto / gvidantino vi dece petas silenton kaj komencas per laŭta esprimo de la vorto „Saluton“ emfazante la antaŭlastan silabon kiel kutime por plursilabaj vortoj en Esperanto. Eventuale ripetu tion. Poste prezentu salutojn el diversaj lingvoj, ekz. „Merhaba“, „Bonjour“, „Salam“, „Dobre dien“.... Intertempe foj-foje denove enŝovu la vorton „Saluton“. Nun jam multaj infanoj kaptas la signifon de la vorto „Saluton“ kaj nun volonte ankaŭ uzas tiun saluton. Estas bone por la atento, se vi ankoraŭ ne klarigas ke la vorto „Saluton“ apartenas al la lingvo Esperanto. Eventuale antaŭe demandu ĉu iu konas aliajn salut-frazaĵojn en aliaj lingvoj kaj ĉu oni ankaŭ parolas fremdan lingvon.

2.2. Prezentado

Daŭrigu per la jena frazo montrante per fingro al vi mem: „Mi estas Fred / Erika Modelnomo“. Poste montru al unu de la infanoj kaj demandu: „Kiu estas vi?“ Ambaŭ frazoj plurfoje ripetiĝas. Dum tio direkte alrigardu la infanojn. Nun certe troviĝas jam iuj, kiuj adekvate respondas uzante siajn nomojn. Tion kompreneble tuj ekkaptu kaj proponu uzi kompletan frazon por la respondo, do „Mi estas Lara“.

2.3. Klarigo

Post la prezentado estas la ĝusta tempo por diri ion pri la 'nova' lingvo Esperanto al la infanoj. Certe sufiĉus klarigi, ke Esperanto estis inventita antaŭ pli ol cent jaroj (1887). La kreinto estis tre saĝa homo (D-ro Ludoviko Zamenhof). Li tiutempe vivis en urbo, kie ankaŭ troviĝis homoj kun diversaj gepatraj lingvoj. Bedaŭrinde la kunvivado ofte ne estis pacema. Esperanto estis kreita por plibonigi la interkompreniĝon por la homoj. (Pliaj informoj troviĝas en la supre menciita broŝuro.)

2.4. Pliampleksigo

Depende de la situacio, oni nun povas ekzerci pliajn esperantlingvajn frazojn aŭ oni tuj decidas daŭriĝi per la voĉlegado de la rakonto (vidu sube). Taŭgaj frazoj povas esti. „Mi loĝas en Modelurbo“ kaj „Kie vi loĝas?“ <Necesas indiko por la prononcado de la litero ĝ. > Kromaj ekzemploj troviĝas ankaŭ en la menciita broŝuro.

2.5. Voĉlegado

La rakonton „La Ora Testudo“ skribis lernantino el la 10-a klaso en la Gimnazio Wentorf / Germanio. Tiu fabelo intertempe estis tradukita en 30 lingvojn [2]. Estas rekomendinde iomete adapti la tekston por la junaj infanoj. Mi faris tion en la germana lingvo [3].

Antaŭ la voĉlegado ĉiu infano ricevas du bildkartojn (bestoj kaj koboldoj / la kliŝon antaŭe kopiu al dezirata formato!). Klarigu al la infanoj, ke la bildoj apartenas al la rakonto. Ĉiam, kiam iu aŭdas la nomon de 'sia' besto aŭ koboldo, li / ŝi montras la koncernan bildkarton. Poste la infanoj devas kolorigi la bildojn per kolorkrajonoj. La nura voĉlegado certe bezonas ĉirkaŭ 15 minutojn. Tial verŝajne estas oportune enmeti kelkajn paŭzetojn. Se eblas, estus tre bone ankaŭ inkludi eventualajn aliajn ĉeestantajn plenaĝulojn por

daŭrigi la voĉlegadon.

Post la voĉlegado estas tempo por aldoni kromajn informojn pri Esperanto. La bestoj en la rakonto interkonsentis pri unu komuna lingvo. Tia lingvo jam ekzistas ankaŭ en la homa mondo, ĝi estas Esperanto.

2.6. Kolorigado de la bildkartoj

Por tio la infanoj sidiĝas ĉe siaj tabloj. Se kelkaj infanoj ne montras inklinon por fari tion (ofte estas ja la knaboj) ofertu al ili substituaĵon, ekz. ludmaterialon en unu angulo de la salono.

2.7. Adiaŭo

Antaŭ ol foriri el la la salono oni adiaŭas per „Ĝis revido!“

3. Proponoj por kontinuigi

Per la eta skeĉo „Konatiĝo kun Esperanto“ oni senpene organizas aldonan instruhoron, kiu poste ebligas allogan prezentadon. Ekzemple dum „Tago de malfermita pordo“ aŭ kadre de vespero por gepatroj la infanoj povas ludi la skeĉon sur podio.

Oni bezonas kvin „aktorojn“, kiuj iom post iom suriras la podion. Krome unu „reĝisoro“ restu en la malantaŭo kaj indiku la enmetaĵojn. Sur la podio staras nur unu benko. La koloritaj bildkartoj de la voĉlegada horo taŭgas tre bone por ornamita tabulo.

Je la komenco de la teatraĵeto la unua aktoro (A) prenas lokon periferie. Poste venas aktoro B, kiu demandas al A esperantlingve „Kiu vi estas?“. A respondas per „Eh?“, evidente komprenante nenion. Kontraŭe, la aliaj (C kaj D) komprenas la esperantan frazeton kaj eĉ povas respondi. La sekvaj scenoj klariĝas al si per la „scenaro“- La lasta aktoro klarigas al la publiko, kial oni prezentis tiun skeĉon (en la loka lingvo).

La apendico „Esperanto ganz kurzgefasst“ (por germanoj) montras la nombrojn 1-100, kelkajn ofte uzatajn esperantajn esprimojn kaj la tekston de la internacie konata naskiĝtag-kanto „Happy Birthday To You“ en la lingvo Esperanto

En Esperanto la nombroj estas vere tre facila afero. Oni nur devas lerni la nombrojn 1-10 por kalkuli ĝis 99. Per „cent“ oni tiam atingas 999. Tiu ekzemplo tre bone montras, ke per nur minimumaj scioj oni povas instrui praktikan aplikon al la infanoj.

Eta superrigardo de la Esperanto-gramatiko (germanlingve) troviĝas ĉe la Svisa Esperanto-Societo [4]. La pdf-dosiero troviĝas ĉe [5].

Kliĉoj: Bildkartoj por kolorigado

Kliĉoj: Bildkartoj por kolorigado

ŝafo

koalo

fiŝo

leono

3.1 Skeĉo por 5 aktoroj

Konatiĝo kun Eperanto

1.	*A sidas sola sur benko*	
2.1	*B alvenas:*	Sa**lu**ton, mi estas _____.
2.2	*A demandas:*	Eh?
3.1	*C venas:*	Sa**lu**ton, mi estas _____.
3.2	*C al B:*	**Ki**u vi **es**tas?
3.3	*B al C:*	Mi **es**tas _____.
3.4	*C al A:*	**Ki**u vi **es**tas?
3.5	*A demandas:*	Häh?
4.1	*D venas:*	Sa**lu**ton, mi **es**tas _____.
4.2	*D al C:*	Ĉu vi kom**pre**nas Espe**ran**ton?
4.3	*C al D:*	Jes, mi kom**pre**nas Espe**ran**ton.
4.4	*D al B:*	Ĉu vi kom**pre**nas Espe**ran**ton?
4.5	*B al D:*	Jes, mi kom**pre**nas.
4.6	*D al A:*	Ĉu vi kom**pre**nas Espe**ran**ton?
4.7	*A demandas:*	Eh, Eh, Esperanto? - Nie gehört!
5.	*E venas, restas staranta kaj parolas en la loka lingvo:*	*Jes -, tial ni prezentis tiun skeĉon, por ke ni kaj vi aŭdu ion pri kaj en Esperanto!*

Tradukoj kaj indikoj (por germanoj. Bonvolu preni vian lokan lingvon!):

2.1 Hallo, Ich bin.... 3.2 Wer bist du?... 3.3 Ich bin...

4.2 Verstehst du Esperanto? 4.3 Ja, ich verstehe Esperanto...

Ĉu = Fragefürwort, mit dem Ja/Nein-Fragen beginnen

Akcento kaj prononcado:

En Esperanto-vortoj ĉiam akcentu la antaŭlastan silabon (kun grasa literoj).
La litero Ĉ estas elparolata kiel Tsch (Tschad).

3.2 **Esperanto ganz kurz gefasst** (por germanoj)

1	unu	Saluton!	Hallo!
2	du	Bonvenon!	Willkommen!
3	tri	Sanon!	Gesundheit!
4	kvar	Kiu vi estas?	Wer bist du?
5	kvin	Mi estas Marko.	Ich bin Marko.
6	ses	Ĉu vi komprenas ?	Verstehst du?
7	sep	Jes / Ne	Ja / Nein
8	ok	Kiel vi fartas?	Wie geht es dir?
9	naŭ	Bonege!	Sehr gut!
10	dek	Malbone!	Schlecht!
11	dekunu	Kio estas tio?	Was ist das?
20	dudek	Tio estas libro.	Das ist ein Buch.
30	tridek	Bonŝancon!	Viel Glück!
100	cent	Dankon!	Danke!

Geburtstagslied für Marko
(Melodie: Happy Birthday)

Korgratulon al vi!
Korgratulon al vi!
Korgratulon al Marko!
Korgratulon al vi!

koro = Herz, gratulo = Glückwunsch

➔ Herzlichen Glückwunsch für Dich!

Aussprache: Der Buchstabe ŝ wird gesprochen wie sch (Schiff), ŭ verschmilzt mit dem vorangehenden Vokal (z. B. a) zu einer Silbe: aŭ wie in Baum.
Der Buchstabe Ĉ wird gesprochen wie Tsch (Tschad).

4. Ligiloj *(aktualigitaj en oktobro 2018)*

[1] www.esperantoland.org/dosieroj/1-eo-stunde-Broschuere.pdf
[2]+[3] www.esperanto-klaus.de/Die-Goldene-Schildkroete/La-Ora-Testudo/
[4] www.svisa-esperanto-societo.ch/de/grammatik.html
[5] www.esperanto-hamburg.de/wp-content/uploads/2015/02/EsperantoKurzgrammatik.pdf

5. Kliĉoj: Bildkartoj por kolorigado

testudo

serpento

krokodilo

koboldo